


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

GIRONUMERO
209354 NEDERL.

JARABONO
NEDERLANDO
0,80 GULDENO

ALIAJ LANDOJ:
16 Fr. Fr.; 0,70 Dol.; 2,1 Sv. Fr.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

MIA VIVO SUR LA NOVA TERO.

Kiam mi alvenis en Ŝinkino, la ĉefurbo de Manĉukuo, en novembro de la lasta jaro, mia unua tasko estis viziti la samideanojn. Ĉi tie la samideanoj estas senescepte gastamaj, kaj ili tuj gvidis min tra la stratoj. La urbo konsistas el du partoj: la kvartalo de la japanoj, kaj tiu de la manĝuroj. La urbo ankoraŭ ne estas kompleta. Unu parto aspektas tre pompe, kaj alia parto aspektas kiel provinca urbeto. Sur la stratoj mi trovis la samajn nomojn de la te-cjoj aŭ restoracioj, kiujn mi jam konis en Tokio. Precipe la burĝa kvartalo de la manĝuroj distris min.

Baldaŭ mi translokiĝis al kampara urbeto, kie mi ĝis nun loĝas. Ses monatoj pasis tre rapide. Mi nun apenaŭ povas kredi, ke mi iam vivis en Tokio, la granda civilizita urbejo. Ĉi tie en la vilaĝo sur la nova tero mi fariĝis kamparano. Mi jam povas kalkuli laŭ la stoploj la kvanton de soj-faboj de la antaŭa jaro. Laŭ la stoploj de „kao-liang” mi povas diri, ĉu la kampo estas vendita, aŭ ĉu ĝi estas por hejma uzo. Ie mi trovis tre longajn stoplojn, kaj aliloke tre mallongajn. Mi demandis pri tio al kamparano. Li respondis: „La stoploj estas tre bonaj brulaĵoj por ni. Tial oni lasas la stoplojn kiom eble plej longaj, kiam oni falĉas la produkton, por ke ni havu pli multe da brulaĵo.” La vintro en Manĉukuo daŭras ĉirkaŭ ses monatojn, do certe necesas konservi sufiĉe da brulaĵoj.

La kamparanoj ne legas ĵurnalojn. La plej multaj kapablas nek legi nek skribi. Sed novaĵoj disvastiĝas inter ili mirinde rapide. Ekzemple, kion mi manĝis matene, tion jam en la tagmezo scias la tuta vilaĝo. Ili estas tre scivolaj. Se iu portas sur si novan ĉapelon, li devas diri la prezon de ĝi al ĉiuj vilaĝanoj.

Iun tagon mi trovis en la oficejo inter fortikaj kamparanoj 12-jaran knabon. Li venis al mi por pruntepreni monon. (Mia oficejo similas al kredit-kooperativo kun unika sistemo, konforma al Manĉukuo). Mi diris al li : „Via patro venu. Kun knabo oni ne traktas.”

Ĉe miaj vortoj ĉiuj ĉeestantoj ekridegis. Oni diris al mi, ke tiu knabo estas jam bona edzo en tia juna aĝo. Mia interpretisto klarigis al mi, ke frua edziĝo estas kutimo en tiu ĉi teritorio. Ne malofte okazas, ke oni jam edziĝas je la aĝo de dek jaroj. Kun amara rideto mi rediris al la knabo : „Kiu havas edzinon, tiu ankaŭ povas esti knabo, almenaŭ ĉi tie. Mi tamen pruntos al vi monon. Iru hejmen, viaj najbaroj bone eskortu vin.”

Pri la moro de frua edziĝo oni legu en la suba popolokanto :

Dekjara edzo.

Estis virgulino dek sep-jara
 Kaj post kvar jaroj, dudek unu.
 La edzo estas apenaŭ dekjara,
 Ŝi do superas lin je dek unu.
 Iun tagon ili iris akvon ĉerpi;
 Unu estas alta, la alia malalta.
 „Se la bopatrino estos malica al mi,
 Mi vin puŝfaligos en la puton.”

„Harmonio inter la kvin gentoj” estas la devizo de la imperio Manĉukuo. Kaj en tiu signifo mi fariĝis amatora kuracisto por la kamparanoj, al kiuj mankas bonaj medikamentoj. Kiam mi pro oficeja afero devas veturi de vilaĝo al vilaĝo, mi kunportas kesteton da medikamentoj. Mi volas uzi la kesteton por montri mian amikecon al la kamparanoj. Sekve miaj okuloj ĉie serĉas malsanulojn. En iu domo mi trovis kuŝantan malsanulon. Mia koro tremetis pro espero utiligi la kesteton. Post la ofica afero mi demandis pri la malsano. Laŭ la respondoj de la familianoj mi kromprenis, ke la malsano estas paralizo, kaj mi konstatis, ke tiu ĉi staras ekster mia kurac-kapablo. Mi devis atendi alian okazon.

Mia veturado sur la „ta-che” (senkovrila ĉevalveturilo, fakte nur portilo por porti lignon, kiu estas la sola trafikilo) ankoraŭ daŭras, kaj dume mi ĉiam esperas utiligi mian medikament-kesteton. Ĉar nun estas multafera sezono por la terkulturistoj, ili bezonas multan monon. Mia oficejo akceptas iliajn prunt-petojn, kaj antaŭ ol doni monon, mi devas esplori la vivstaton de ĉiu petanto. Iun tagon dum la veturado subite ekpluvegis. Bedaŭrinde la pluvo ne ĉesis. Longan

tempon mi sidis malseka sur la „ta-che”. Fine mi ordonis al la veturigisto serĉi rifuzejon. La domo, al kiu li kondukis min, estis tre mizera. Interne regis mallumo kaj malbonodoro. Mi petis fajron kaj varmegan teon. Tiam mi subite vidis malsanulinon. Ŝi kuŝis sur lito, kun palaj vangoj, kaj spiris tre malfacile. La atmosfero estis naŭza. Mi ne kuraĝis preni la teon, nek resti tie pli longe. Mi tuj ordonis al la veturigisto daŭrigi la veturadon en la pluvego. Por kvietigi mian humanismon mi diris al mi : „Mia kesto ja ne enhavas taŭgan medikamenton por ftizulo.”

Iun tagon la ĉielo brilis, kaj „ta-che” vagadis malrapide. Estis tute dormema veturado. Mi parolis al la interpretisto.

„Estas multaj fazanoj.”

„En la vintro la kamparanoj ofte kaptas la fazanojn sen iloj,” diris mia kunulo. „La fazanoj venas al la tero por serĉi manĝaĵojn sur la neĝo. La temperaturo, tridek-kelkajn gradojn sub la nulo, frostigas la piedojn de la birdoj. Ili perdas la konscion kaj kiam kamparano alproksimiĝas li povas kapti ĝin.”

En mia vilaĝeto troviĝas lupoj. Iun nokton lupoj atakis la porkojn en mia korto. La sekvan matenon mi vidis sangmakulojn sur la pajlo. Kompatinda porketo! Sed mi devis rimarki, ke estas al porko egale, ĉu ĝi estas buĉata de la homoj, aŭ mordata de la lupoj.

Mi konatiĝis kun multaj kamparanoj kaj mi tre ofte pasigis nokton en ilia domo. Mia vivo sur la nova tero tute alkiutimiĝis al la ĉirkaŭaĵoj. Ofte mi vizitas Ŝinkinon. Ĝi jam estas por mi granda metropolo. Ĉe ĉiu vizito al la urbo mi avide enspiras la kulturan atmosferon, kiun mi antaŭe ne sentis tie.

Macumoto-Ken'iĉi.

El „La Revuo Orienta”.

LA SURPRIZO.

SinJORINO eniris butikon kaj diris : „Volonte mi havus lanan dorskovrilon por mia hundeto.”

„Kiom granda estas la besteto?” demandis la servisto.

La sinJORINO ne precize sciis tion.

„Kunportu la hundon, sinJORINO, tiam mi povas almezuri.”

„Ne, tio ne eblas,” respondis la kliento. „Ĝi estu surprizo por Azor!”

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

Campa concentracion
Porta-Coeli, 19-9-1939.

...Mi ricevis „La Juna Vivo” No 12, de Junio, koran dankon. Avide mi tralegis ĉion. La tutan enhavon mi tradukis al la ĉi tieaj malliberuloj. La rakonto de M. v. E. kaj la publikigita parto de mia rakonto de 1936 tre interesigis la aŭskultantojn por nia kara lingvo.

Kun mi estas junulo madrida, esperantisto ekde sia 8-a jaro. Ni ambaŭ nur parolas esperanton. Li multe helpas al mi en la propagando.

Mia penso, mia entuziasmo kaj mia tuta animo estas kun vi. Dio gardu vin multajn jarojn por la bono de 'l homa idealo, Esperanto.

Miaj memoroj al amikoj viaj.

Justo Estan.

... Ni esperantistoj havas grandan kaj noblan laboron por fari. Ni devas montri, ke ĉiaj militoj estas maljustaj kaj malpravaj. Okazis en la tuta historio de la mondo nenia justa milito. Ni devas lerni kaj relerni la saĝajn leĝojn de l' vivo kaj labori por reala paco. Paco estas la plej grava kaj benita akiraĵo en la mondo. La estontecon mi ne scias, sed en mia koro kaj mia menso, mi scias, ke, se ni laboras por paco, studas pri paco, kaj pensas pri paco, ni kontribuas nian etan parton al la konstruado de la nova mondo. Eble en la estonteco floros la arboj de paco kaj bonvolo.

Bristol (Anglujo). E. T. Baggs (lernanto de G. B. Tordoff).

3-8-1939.

...Mi skribas ĉi tiun leteron ĵaŭde, la trian, kun la plena konscio, ke mi ne povos ĉeesti la Kunvenon en la nuna jaro. Tamen, dum la tuta semajno miaj pensoj forflugas al la belga urbo, kie preskaŭ kvarcent gejunuloj el multaj diversaj landoj kolektiĝos en unu granda rondo, por la ĝuado de eksterordinara festo, kiun oni nur unufoje en jaro povas vidi. Kiel mi sopiras al tiu urbo Tervueren, pri kiu mi jam multe legis sed ankoraŭ ne vidis! Mi estas tute certa, ke mi parolas por ĉiuj anglaj T. J. O.-anoj, kiuj pro diversaj kialoj ankaŭ ne povas partopreni la nunjaran feston, kiam mi, el la profundo de mia koro deziras al la Kunveno varman saluton kaj esperon por granda sukceso ĉiufanka.

Ĉar mi ne povas ĉeesti, mi ne povas buŝe meti antaŭ vi proponon por la venontjara kunveno. Sed per la nuna skribaĵo mi deziras

certigi al vi, ke ni en Anglio multe ŝatus aranĝi la Kunvenon por 1940 en Anglio. Se vi jam ricevis aliajn proponojn, aŭ se oni pensas, pro iu aŭ alia kaŭzo, ke nia lando apenaŭ taŭgus por la granda festo, tiam kompreneble mi ne ofendiĝos. Certe estas, ke la plejmulto el nia membraro devus trapasi la oceanon por atingi la kunvenlokon, kaj eble la demando pri la vojaĝelspezoj ne facile estus solvebla por multaj membroj. Sed la angloj ja dum du jaroj pasis la oceanon kaj sendube la ideo de vizito al Anglio ne estus sen intereso por niaj eksterlandaj geanoj. Mi povas certigi al vi, ke ni aranĝus bonegan feston kaj klopodus provizi simile allogan programon kiel la Groet-a kaj Tervuren-a kunvenoj. Se nia estraro akceptus mian proponon, mi tuj komencos labori por la efektiviĝo de sukcesega kunveno. Kvankam mi ankoraŭ ne interrilatis kun nia kimra perantino pri mia propono, tamen mi estas certa, ke ŝi plene kunlaborus, kaj do du perantoj kun iliaj lokaj perantoj sendube ellaborus treege efikan programon.

John W. Holland.

Je nia granda bedaŭro ĉi tiu letero perdiĝis en Tervuren, tial ni nun publikigas ĝin en „La Juna Vivo”. Se niaj anglaj amikoj sukcesus kolekti monon por malaltigi la restadkostojn de la eksterlandaj gejunuloj, tiam ni certe volus veni al Anglio.

(La estraro de T. J. O.)

ENIGMOJ

Ĉenenigmoj.

Ĉiuj vortoj konsistas el du silaboj. La lasta silabo de la antaŭa vorto estu la unua silabo de la sekvanta vorto. La lasta silabo de la lasta vorto estu la unua silabo de la unua vorto.

- | | | | | | | | |
|----|---|---|-------------------------|-----|---|---|---------------------------------------|
| I. | 1 | 2 | ŝtofo | II. | 1 | 2 | virina vestaĵo |
| | 2 | 3 | limigita parto de spaco | | 2 | 3 | utila mambesto |
| | 2 | 1 | malpuraĵo | | 3 | 4 | krio |
| | | | | | 4 | 1 | la plej grava parto en la homa korpo. |

La solvo el No 1.

Koridoro
Oratoro
Rabato
Italo
Doto
Oro
Ro
O

La premiojn gajnis :
F.ino J. P. Gunstra en Leeuwarden (Ned.).
Frato Wigbertus van Zon en Vught (Ned.).

Por komencantoj.

La mallaborema ĝardenisto.

Sinjoro dungis tre mallaboreman ĝardeniston. Iun tagon la mastro sendis lin en la ĝardenon por labori. Sed li ekkusis sub la fruktarboj kaj baldaŭ dormis. Post iom da tempo la mastro iris en la ĝardenon por vidi, kiom da laboro la ĝardenisto jam faris. Li serĉis lin ĉie, kaj fine trovis lin sub la arbo. Li tiom koleriĝis, ke li forte skuis la viron, por veki lin.

„Ĉu vi tiel laboras?” la sinjoro demandis al la maldiligentulo, „Vi ne meritas, ke la suno brilas sur vin!”

„Tion mi bone scias,” trankvile respondis la ĝardenisto. „Pro tio mi kuŝas en la ombro.”

N. Rees.

Seven Sisters, Kimrujo.

Kion dungis la sinjoro? Kia estis la ĝardenisto? Ĉu la sinjoro sciis tion? Kion la ĝardenisto devis fari? Ĉu li tuj eklaboris? Kion li faris? Kien iris la sinjoro? Ĉu li trovis la serviston? Kiel la sinjoro traktis la ĝardeniston? Kion li diris? Ĉu la ĝardenisto hontis? Kion li respondis?

Facila metodo (Portugala humoraĵo).

Inter du ŝtelistoj.

„Ha! Kian belegan aŭtomobilon vi havas, Petro! Ĉu vi ŝtelis ĝin?”

„Tute ne, Johano! Mi aĉetis ĝin!”

„Belege. Vi do honestiĝis. Kiom da mono kostas la aŭtomobilo?”

„18.000 eskudojn.”

„Bone, kaj la monon Petro, kie vi akiris ĝin?”

„Ho, Johano! La monon, mi ŝtelis ĝin.”

Lisboa (Port.). El la portugala lingvo trad., A. Ferreira.

Li ne kaptis fiŝojn.

Fiŝkaptisto ne havas feliĉon. Li sidis jam tri horojn, metis jam dudekfoje freŝan panon sur la hokon, kaj ankoraŭ li kaptis nenion.

Jen venas policisto : „Eh, sinjoro! Kion vi faras? Vi ja scias, ke oni ĉi tie ne rajtas kapti fiŝojn?”

„Mi ne kaptas fiŝojn, kara sinjoro, mi nutras ilin!”

Tiu bona, antikva tempo !

Kiam Benjamin Franklin en la jaro 1784a intencis eldoni novan ĵurnalon, lia patrino tre malkonsilis tion al li, ĉar en Ameriko ekzistis jam du ĵurnaloj !

Tri veroj.

En la katedralo en Milano oni povas legi tri verojn. En unu el la vestibloj staras sur arkaĵo, sub bukedo da rozoj : „Ĉio, kio estas agrabla, daŭras nur momenton.”

En la dua vestiblo estas kruco sur la muro, kaj ĉirkaŭ ĝi staras : „Ĉio, kio ĉagrenas, daŭras nur momenton.”

En la tria staras : „Nur kio estas grava daŭras eterne.”

Ne !

Juna kuracisto havas ankoraŭ tre malmultajn pacientojn. Iun tagon li estas en sia studoĉambro. Lia servisto envenas kaj diras : „Doktoro, la knaboj forŝtelas viajn nematurajn pomojn el la ĝardeno. Ĉu mi forpelu ilin ?”

La kuracisto pensas momenton, kaj diras tiam decide : „Ne”.

Tion ne sciis la hundo !

Heĉjo kaj Peĉjo promenis kune sur la Maas-ponto en Rotterdam. Subite alkuris hundo, kiu laŭte bojis. Tuj Heĉjo grimpis sur unu el la ponto-stangoj.

„Sed Heĉjo,” kriis Peĉjo, „ĉu vi ne scias, ke bojantaj hundoj ne mordas? La instruisto ja diris tion!”

„Jes,” kriis Heĉjo de supre. „Tion vi scias, kaj tion scias la instruisto. Sed tion ne scias tiu eta besto!”

Kie promenis Heĉjo kaj Peĉjo? Kie kuŝas Rotterdam? Ĉu ankaŭ estis hundo sur la ponto? Kion faris la hundo? Kial Heĉjo grimpis sur la stango? Kion diris Peĉjo? Kial Heĉjo ne iris malsupren ?

Valuto.

Du sinjoroj parolis pri spekulaciado per fremda mono. Ili fanfaronis pri la mono, kiun ili gajnis per tio.

Tria sinjoro jam longe aŭskultis. Fine li miksis sin en la interparolo.

„Se vi parolas pri feliĉo, tiam mi havis feliĉon. Mi aĉetis ion antaŭ naŭ monatoj je 11, kaj nun ĝi staras je 46.”

„Kio estis tio ?” demandis la aliaj samtempe.

„Termometro.”

Milito.

Fokso, la reĝo de la hundoj, forprenis de Puso, la reĝino de la katinoj, dikan muson. Pro tio la katoj deklaris la militon al la hundoj.

La batalo komenciĝos tre frue en la mateno, la kvaran tagon post la militdeklaro. Ili interbatalos en granda herbejo. Unuflanke staros la plej kuraĝaj katoj, je la alia flanko la plej bonaj hundoj.

Estis terura bojado kaj miaŭado en tiu mateno. La hundoj staris, la ŝaŭmo en la buŝo, kaj kun knarantaj dentoj. La okuloj de la katoj radiis kuglojn, kaj kun kurbita dorso kaj dika vosto ili atendis por komenci la batalon.

Fine la reĝo donis la signalon por la atako. La hundoj, kun siaj akraj dentoj, flugis antaŭen. La katoj, kun siaj akraj ungoj, flugis renkonten. Furiozega batalo sekvis. Oni mordis kaj gratadis. Estis bojado, grumblado, siblado, blovado de la furiozaj bestoj.

Timtremiga spektaklo post la batalo! Je la flanko de la katoj estis tramorditaj nukoj, kelkaj perdis la voston, aliaj la kruojn. De multaj fluegis la sango el larĝaj vundoj. Kaj je la flanko de la hundoj? Kelkaj kuŝis kun la lango el la sanga buŝo. De aliaj pendis la okuloj el la kapo. Ĉe multaj la bela felo estis tute disŝirita, kaj plena de sango.

Amikoj, ĉu tio ne estis granda stultaĵo? Kaj ankaŭ kruelaĵo? Sed — tiel la bestoj ne batalas! La homoj, jes, kaj tiam miloj da niaj plej bonaj knaboj trovas la morton, aŭ estas terure kripligitaj. Ho homo, kiu fieras pri via genieco kaj boneco, kial vi ne volas forigi tiun skurĝon?

Mechelen (Belgujo). Laŭ flandra legolibreto, H. Rainson.

Kiel nomiĝis la reĝo de la hundoj? Kion forprenis Fokso? Kiu kaptis muson? Kial la katoj deklaris la militon? Kiam okazis la batalo? Kie oni interbatalis? Ĉu estis multa bruado dum la batalo? Kiel aspektis la hundoj antaŭ la batalo? Kiel aspektis la bestoj post la batalo? Ĉu la milito estis saĝa? Ĉu bestoj tiel militas? Kiu militas tiel kruele?

La vero.

Per anonco oni serĉis knabon por oficejo. Iu knabo venas por prezenti sin.

„Sed aŭskultu!” diras la direktoro. „Ni ĉi tie ne povas uzi maldiligentajn knabojn. Ĉu vi ŝatas forte labori?”

„Ne sinjoro,” respondas la knabo.

„Ha tiel! Vi ne ŝatas forte labori. Sed ni nur akceptos knabon, kiu tion ŝatas!”

„Tiaj ne estas!” ekkrias la knabo.

„Ho certe. En la mateno jam anoncis sin ses!”

„Kaj kiel vi eksciis, ke ili ŝatas laboregi?”

„Ĉar ili mem diris tion!”

„Ho, tion ankaŭ mi povus diri, sed mi ne estas mensogulo!” diras la knabo. „Se vi akceptas min, mi laboregos. Sed mi mensogus, se mi dirus, ke mi tion ŝatas. Kaj mi ne okupas min pri mensogoj!”

La direktoro ridas, kaj la knabo ricevas la oficon.

Aglo kontraŭ homo.

Okazas tre malofte, ke aglo atakas homon. Tamen mi iam legis, ke tio okazis en Vermlando, en Svedio. La arbargardisto Sven Petterson dumnokte promenis en la arbaro. Li lumigis la vojon per elektra poŝlanterno. Subite li aŭdis tuj super sia kapo fortan bruaĉon de flugiloj, kaj sammomente li ĵetiĝis teren. Feliĉe la viro ankoraŭ sukcesis kapti pezan branĉon, per kiu li batis la atakanton sur la kapon. Pro tio la besto mortis. Montriĝis, ke estas aglo, kies streĉitaj flugiloj kune estis pli larĝaj ol du metrojn. Verŝajne la lumo de la lanterno allogis la beston. Petterson nur ricevis la ektimon kaj kelkajn gratojn. Dum la lasta jarcento oni en Vermlando apenaŭ vidis aglon. La sveda leĝo ŝirmas ilin, same kiel la ursojn.

Tasko.

1. Kopiu kaj traduku la rakontojn en la rubriko por komencantoj.
2. Notu la vortojn, kiujn vi ne konas, kaj poste lernu ilin.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de la „La vero”, de „Aglo kontraŭ homo”, kaj de „Facila metodo”.
4. Lernu parkere : „Li ne kaptis fiŝojn”, „Tri veroj”, „Ne”, „Valuto”, „Tiu bona antikva tempo”.

„La Juna Vivo” jam sufiĉe kutimis al malfacilaĵoj kaj al batoj de la sorto; ni ne perdas la esperon, kaj ni tute ne ĉesos laboradi, kaj daŭrigi nian aferon. Sed la nuna sortobato superas ĉion. Ĝi devigas nin vole-ne-vole provizore dumonate eldoni „La Juna Vivo”. Dume ni petas niajn amikojn en- kaj eksterlandajn, kiuj havas neniajn malhelpojn, forte kaj energie subteni nian laboron, por ke ni povu aperigi „La Juna Vivo”. — Ne forgesu, ke nia gazeto estas la koro de la Tutmonda Junular-Organizo.

JUNULARO DE T. J. O.

Malgraŭ pluva aŭtun',
 Kolektiĝis ni nun
 Ĉiuj kune por kanti amike.
 Junular' estas ni,
 Kiu por harmoni'
 Diligente laboras formike.

Nur al brava T. J. O. rond'
 Apartenas la mond'.
 For fimeroj! Por ĝojo ni tostas!
 Ni simile al agloj
 Aspiras je sun';
 En la koro printempon ni portas.

Kaj ni iuj per kant',
 En la lingvo de stel'
 Verda, vokas elkore : „Bonvenon!”
 Senhezite tra ŝtormo fiera barkas'
 Via naĝu en nian havenon.

Ludmila Jevsejeva.

D-ro EMILO JAVAL.

(Nekrologa artikolo. 21-1-1907)

Foriris unu el la plej gravaj esperantistoj, falis unu el la plej ĉefaj niaj kunbatalantoj, — mortis Doktoro Emilo Javal.

Tre doloran impreson ĝi faris sur min, kiam mi antaŭ dek tagoj eksciis pri lia senespera stato; kaj kvankam mi en la daŭro de dek tagoj havis sufiĉe da tempo, por al kutimiĝi al la atendata neevitebla, fina katastrofo, tamen, kiam mi hieraŭ ricevis la sciigon pri la morto de Javal, ĝi frapis min tre preme.

Multaj esperantistoj konis la nomon de Javal, sed ne multaj sciis precize, kian gravan rolon li ludis en nia afero, ĉar li apartenis al tiuj tre maloftaj homoj, kiuj faras ĉion silente, kaj kiuj serĉas sian tutan rekompencon ne en la laŭdado de la homoj, sed en la konscio, ke ili faras bonan faron. Antaŭ pli ol unu jaro, tuj post la Bulonja kongreso, li grandparte partoprenis en la fondo de la „Centra Oficejo”, kaj ankoraŭ en la Ĝeneva kongreso, t. e. post unu jaro, nur, 4-5 personoj sciis, ke li estis la ĉefa monhelpanto de tiu oficejo kaj ke, por doni al ĝi la eblon bone aranĝiĝi, disvolviĝi kaj regule funkcii en la daŭro de certa nombro da jaroj, li oferis por ĝi el sia propra poŝo tre grandan sumon.

Sed kiel ajn malavara estis lia donaco al la afero esperanta, — liaj ĉefaj meritoj konsistis ne en tiu donaco, sed en lia energia, sindona kaj konstanta laborado por nia afero. Se lia donaco eble ne donos tiajn grandajn fruktojn, pri kiaj li revis, kaj se liaj laboroj ne alkondukis ankoraŭ al tiu celo, pri kies baldaŭa atingo li estis tute konvinkita, — liaj faroj kaj lia sindona kaj senĉesa laborado havos grandan signifon por la estonteco de Esperanto; kaj des pli meritaj estas liaj penadoj, ke ili estis farataj de homo, por kiu ĉia laboro estas multe pli malfacila ol por aliaj, — de homo blinda; ne de homo blinda

de naskiĝo, sed de homo, kiu blindiĝis en la 62-jaro de sia vivo kaj tamen ne fariĝis apatia por ĉio en la mondo, kiel la pliparto de liaj samsuferuloj, sed ne ĉesis servi al siaj idealoj kaj al la homaro.

La plimulto de ni konis la mortintan kiel eminentan blindan esperantiston, nenio pli; ĉar li partoprenis en nenia publike aganta kamitato, li ne bruis per siaj faroj; tamen en la lasta tempo li estis la centro, ĉirkaŭ kiu grupiĝis ĉiuj plej eminentaj esperantistoj, ĉar antaŭ ol ni sciis, ke li havas la intencon kaj la povon fari al Esperanto malavaran donacon materialan, ni konis lian grandan valoron moralan, ni konis lin kiel homon, tre kleran, saĝan, bonegan lingviston, noblan, laboreman kaj influan.


La mortinto estis persono tre konata en la mondo kiel fama okulkuracisto, kaj ankaŭ kiel ĉiuflanke instruita verkisto; krom tio li estis bone konata kaj influa en sia lando kaj urbo, ankaŭ kiel politikisto.

De la momento, kiam li, antaŭ kelke da jaroj, estante jam blinda, ekkonis Esperanton, li fordonis sin al ĝi per sia tuta koro. Kvankam blinda kaj maljuna, li en la daŭro de tre mallonga tempo perfekte ellernis Esperanton. Li legigis al si preskaŭ ĉion, kio aperis en aŭ pri Esperanto, kaj li konis bonege la tutan literaturon kaj historion de Esperanto. Li tre multe korespondadis per Esperanto, skribante preskaŭ ĉiujn leterojn propramane, per helpo de aparta skriba aparato, elpensita de li mem. En la lastaj du jaroj li vivis preskaŭ ekskluzive nur por Esperanto, kaj al lia energia laborado nia afero dankas multajn el siaj sukcesoj en Francujo. En la lasta tempo li fervore laboris, por igi la francan registaron, enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn.

Estante jam ne tute sana, li veturis tamen al la kongreso Ĝeneva. En Oktobro mi, laŭ lia deziro, vizitis lin en Parizo; kaj, malgraŭ ke li tiam estis jam serioze malsana kaj antaŭdiris al mi, ke li ne vivos pli ol kelke da monatoj, li pasigis kun mi kelkajn tutajn tagojn en laborado esperanta, li faris kun mi vizitojn, preparajn studojn, ktp. Kiam ni pri unu punkto neniel povis interkonsenti kaj miaj profesiaj okupoj ne permesis al mi, resti pli en Parizo, tio ĉi lin tiel turmentis, ke li tute serioze estis preta veturi kun mi Varsovion, por daŭrigi la diskutadon. Blindulo-maljunulo volis pro Esperanto veturi en malproksiman kaj danĝerplenan landon! Post mia forveturo li, malgraŭ sia malbona farto, veturis ankoraŭ Bruselon, por priparli kelkajn demandojn de propagando kun la komandanto Ch. Lemaire.

Javal estis esperantisto pure idea. Esperanto povas estis fiera pro tio, ke ĝi havis Javalon; Esperanto estos feliĉa kaj glora, se ĝi havos multe da Javaloj.

Mi ne povas jam saluti vin, kiel mi faris tiom multe da fojoj, — mi salutas malĝoje vian cindron, kara, neforgesebla amiko !



KORESPONDADO

De la tukoj, kiuj ornamis la festsalonon en Tervuren mankas ankoraŭ unu, kiun ni luis de la studenta ligo. Estas verda tuko, kiu pendis sur la scenejo, longa 3.5 m., larĝa pr. 80 cm. Se iu povas informi, ni afable petas, ke li sciigu tion al S.ro Noë (Kerkstraat, Tervuren), ĉar se la tuko perdiĝis, ni devas aĉeti novan.

Atentigo.

Post la foriro de la aŭtobuskaravano de Tervuren oni trovis en la trinkejo en Rotterdam bluan ŝtonon, verŝajne el ringo. Oni povas informpeti pri tio al la kasisto de T. J. O., S.ro M. v. d. Horst, Johan Idastraat 32, Rotterdam.

Responde al nia peto en la antaŭa numero, S.ro v. d. Schaaf en Leeuwarden sendis al ni f 1,60 por 2 abonoj. Ni sendas „La Juna Vivo” al : José Ma Bernabeu, Rambla 24, Calossa de Segura (Alicante) kaj al Teresa Ferré, Avenida del General Lucipo de Llano 18, Alcover (Taragona), ambaŭ en Hispanio. — **Espereble multaj sekvos la bonan ekzemplon !**



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Nederlando : Laboristo deziras korespondi kun ĉiuj landoj, interŝ. pm. H. Letsch, p/a. M. de Vries, Gasstraat, Schiedam.

Nederlando : Jenneke v. Veenendaal (instruistino, 19 jara) deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj landoj. Adreso : Kapelweg, Limmen.

Anglujo : S.ro Stanley Cann, 17-j. oficisto, dez. kor. k. interŝ. pm. k. gemikoj en ĉ. l. 16, Cinchor Rd, Kingswood, Bristol. Certe resp.

Ĉeĥoslovakujo : 16-j. junululo dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo, por ke li informu pri la esp. vivo en Ĉeĥio kaj Moravio. Oldrich Simon, Lysá n/Laben, Velachova 1183.

Francujo : S.ro Duquenne, 190, rue de Douai, Sin-le-Noble (Nord), dez. kor. kaj interŝ. pm. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Resp. certa.

Nederlando : S.ro J. Vos Jr. (32-jara), Zoomstr. 32a, Rotterdam-N., dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

Portugalujo : Juna F.ino dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉiuj landoj. F.ino M. P. Duarte, str. de Misericordia 37, Ponta Delgada, Açores.

Estonio : 14-jara knabino dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉiuj landoj. F.ino Laine Kurss, Paatsalu p.-ag Oeküla.



RICEVITAJ ESPERANTAJOJ

UNUA LEGOLIBRO, dua eldono plibonigita (eldono de S.A.T.), 112 paĝoj form. 12 × 17 cm., prezo 10 fr. fr. Kun multaj ilustraĵoj kaj lingvaj klarigoj por komencantoj. Mendoj direktu nur al S. A. T., 67, avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

JARLIBRO INTERNACIA ESPERANTO-LIGO 1939, neaĉetebla, nur por uzo de la membroj.

T.J.O-PAKETO : 5 kovertoj, 5 leterfolioj, 5 poŝtkartoj, 2 il. kartoj, 25 glumarkoj. Prezo nur 25 cendoj (2 resp. kuponoj). Adreso : Fl. Meydam, Lingestr. 11, Leerdam, Nederlando.

„LA JUNA VIVO”, Junulargastejo en Quimper (Bret.), Francujo. Malfermiĝis nur la 14-an de julio '38, kaj jam dum la unuaj monatoj vizitis ĝin pli ol mil gejunuloj, inter kiuj ĉ. 150 eksterlandanoj. Ni esperas, ke la junaj esperantistoj kun speciala plezuro vizitos ĉi tiun esperanto-hejmen! Oni tie trovas La Juna Vivo en „La Juna Vivo” en „La Juna Vivo”.

BUDAPEST, la reĝino de la Danubo, belega faldprospekto, kun urboplano. Eldono de ĉefurba Fremduloficejo en Budapeŝto.

PETRO, 7-a eldono neŝanĝita. 116 paĝoj. Riĉe ilustrita lernolibro. Prezo 9 fr. fr. Eld. : SAT, 67 avenue Gambetta, Paris (Francio).

VIOLETOJ, versaro. Enhavo : 50 versoj, bela, simpla enhavo, bona ritmo. Verkisto : B. Giedra. Eld. Litova Esperanto-Asocio, Kaunas. Prezo : 0,50 gld.

ANONCETOJ (30 c. ĉiu linio).

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK, A. G. J. v. Straaten. Ampleksa, tolbindita libro, Esperanto-Ned., Ned.-Esp. Klara preso. Prezo nur guld. 2,25. Mendebla al „La Juna Vivo”.

KANTARO „LA JUNA VIVO”. Form. 16 × 12 cm. Enhavo : 34 kantoj kun muziknotoj. Tre taŭga por grupkunvenoj. Prezo : po 35 c.; 2 ekz. por 50 c.

LA VINTRAJ KURSOJ KOMENCIĜAS. Uzu la Internacian Lernolibreton „La Juna Vivo”. — La plej malkara lernilo. Belaspekta libreto. Enhavo 16 lecionoj. Prezo : 20 c. Rabato ĉe grandaj mendoj.

TAUGA MATERIALO POR ĈIUJ KURSOJ troviĝas en la binditaj jarkoletoj de „La Juna Vivo”. Enhavo : belaj rakontoj por progresintoj, simpla legaĵo por komencantoj, ŝercoj, enigmoj, kantoj, ludoj, ktp. Bonega materialo por grupvesperoj. Prezo nur 35 c. plus afrako.

Aliĝu al „Tutmonda Junular-Organizo”.
Jarkotizo, inkluzive „La Juna Vivo” : 1,00 guld.

LA PERANTO inter la perantoj

Propagandorgano de Tutmonda Junular-Organizo No 5. Okt. 1939.

Redaktoroj : Floor Meydam kaj Job Kars, Meent, 35, Leerdam (Nederlando)

NI FOSU NIAN SULKON.

Kion ni timis jam longan tempon nun kruele realiĝis. Denove la homaro devas iri la krucvojon de la milito, nesciante kiam aŭ kie ĝi finiĝos.

Terura estas la tempo en kiu ni vivas. Miljaroj de civilizado ne estis sufiĉaj por forigi la teruran monstron, kiu nomiĝas milito.

Denove la popoloj batale atakas unu la alian. En maro de sufero, mizero, sango kaj larmoj la mondo perdiĝas. Kaj same kiel antaŭe aŭdiĝas la senesperaj voĉoj, esprimantaj la neresponeblan demandon : Kial ?

Ĉiujn landojn trafis la milito. Se ne rekte, tiam nerekte. Sed ĉie ĝi sentiĝas. Ĝi tuŝas kaj baras la tutan vivon. Ankaŭ en nia Esperanto-movado ni ege sentas ĝiajn sekvojn. Eĉ tre ege !

La internacia trafiko malbone funkcias. La sendado de leteroj kaj mono, precipe al la militantaj landoj, same. Ne necesas detale paroli pri ĉi ĉio. Ni ĉiuj sentas tion en niaj landoj.

Krome la homa spirito ankaŭ ricevis fortan baton. Ĉiu sentas la sekvojn de la necerta situacio kaj rigardante ĝian evoluon, multaj perdas la kredon je ĉio.

Tute komprenebla sed tamen netolerebla afero! Neniam ni rajtas perdi la kredon aŭ senesperigi !

Estas vere, ke — precipe eksterstarantoj — momente juĝas nian idealon — interfratigi la homaron — io freneza. Ni mem scias, ke ĝi ne estas tia. La teruraj tempocirkonstancoj povas timigi nin. Ili povas vekti en ni dubon sed tute estingi en ni la kredon je nia idealo ne eblas al ili !

Ĉu ne pruvigi al ni per nia korespondado aŭ persona konatiĝo al eksterlandaj geamikoj, ke ĉie ajn en la mondo estas la homoj samaj? Ke en ĉiuj regas nur unu forta sopiro PACO.

Ĉu ne al ni, T. J. O. anoj, tio pruvigi antaŭ kelkaj semajnoj en

Tervuren dum nia Internacia Junular-kunveno ? Ĉu ne estas vere, ke tie ni gaje trapasis festsemajnon kaj formis en konsento unu grandan rondon familian ?

La memoroj pri ĉi ĉio ankoraŭ vigle vivas en ni kaj forte ni kontraŭstaras la atakojn de malespero, kiuj de tempo al tempo minacas nin.

Geamikoj, estas nun, pli ol iam antaŭe, ege necese, ke ni daŭrigu nian laboron por Esperanto kaj T. J. O. Multajn malfacilaĵojn ni renkontos, sed ni persistu.

T. J. O. sendube suferos pro la milito. Sed ni faru tiajn suferojn kiel eble plej malgravaj. Ĉiuj povas helpi en tio. Ni laboru laŭ fiksa plano.

La internacia kontakto ne plu estas facila. Tial ni en ĉiu lando nin direktu al niaj landaj ĉefperantoj. Ili reprezentas la T. J. O. estraron en la koncernaj landoj. Al ili vi pagu vian kotizon kaj petu, se necese, informojn. Ili regule havos kontakton kun la estraro. En Nederlando la estraro prizorgos la diversajn aferojn. Se ni ĉiuj komprenas nian taskon, sukcesos al ni gardi la ĝis nun faritan laboron kontraŭ ĉia ajn danĝero kaj konservi ĝin por la tempo de paco, kiu nepre sekvos ĉi tiun malluman tempon.

Do geamikoj, restu fidelaj : Nur per la helpo de vi ĉiuj ni povos konservi, kion ni helpe de vi ĉiuj konstruis.

La laboro por Esperanto neniam estis facila. Nun ĝi estas ankoraŭ malpli facila. Ĝi postulos multon de nia forto, kredo kaj espero. Sed ni persistu, kio ajn okazu. Kaj se la fatalo foje fariĝos tro malfacila, tiam ni direktu la rigardon al la alta figuro de nia Majstro kaj divenu, ke kie li ricevis forton, kiam li, mokate de la homoj kaj puŝate de la sorto, tamen povis daŭrigi kaj elfini sian laboron.

Ni laboru, konvinkite ke ni iras „per Esperanto al Paco” !

RAPORTO

**pri la Jarkunveno de „Tutmonda Junular-Organizo”
en Tervuren (Belgio), la 12an de Aŭgusto 1939a.**

La prezidanto malfermas la kunvenon kaj memorigas la rapidan evoluon de la organizo. Li priskribas, kiel T. J. O. tute nepreparate fondiĝis, kaj en la tempo de unu jaro elkreskis je organizo kun 850 membroj en 21 landoj, kiu jam havas propran flagon, propran kanton, kaj propran insignon kaj eldonas tri gazetojn.

La protokolo pri la unua kunveno en Groet kaj la jarraporto de la sekretario estas aprobataj.

S.ro Krijt esprimas sian admiron pri la laboro de f.ino Jekke van Dijk, kiu tute sola faris la T. J. O. flagon laŭ propra projekto. En la nomo de ĉiuj T. J. O. anoj li dankas ŝin pro tio.

Unue la fako de la „membrosimpatiantoj” estas pritrakta. S.ro Krijt diras, ke nur en Nederlando la nombro de ĉi tiuj membroj estas sufiĉe kontentiga. Li klarigas la metodon, kiun oni aplikas en Nederlando por varbi ĉi tiujn simpatiantojn; i. a. oni aranĝis konkurson inter varbantoj. La plej bona propagandilo estis la nederlandlingva propagandorgano „De Esperantist”. Tial li instigas la membrojn el la aliaj landoj klopodi eldoni similan gazeton. Montriĝas, ke la ĉefperantoj de Anglio, Jugoslavio kaj Svisio jam antaŭpreparas tion.

Sekvas mallonga diskuto pri la karaktero de tia gazeto por la aliaj landoj. Kelkaj personoj opinias, ke tiuj gazetoj povas esti tradukoj de „De Esperantist”, kun aldono de artikoloj, taŭgaj speciale por propagandi en la koncerna lando.

S.ro Krijt dubas, ĉu la artikoloj, kiuj aperis en „De Esperantist” estas taŭgaj por la aliaj landoj. S.ino van Veenendaal-Bouwes opinias ilin bonaj; laŭ ŝi la gazetoj estu similaj al „De Esperantist”, sed ankoraŭ pli simplaj. Ili enhavu rakontojn, bazitajn sur la zamenhofa idealo; ili instruu al la legantoj amon kaj fratecon.

La filmserva raporto estas pritraktata kaj aprobata. S.ro Schut (prizorganto de la filmservo) instigas la grupojn aŭ individuajn membrojn el la diversaj landoj, mendi kopion de la filmo de la nuna Junular-kunveno; tia kopio kostos 50 nederlandajn guldenojn, kaj oni facile povos reakiri la monon per ludonado de la filmo.

S.ro van der Horst (kasisto) klarigas la financon jarraporton. Li opinias, ke estas miraklo, ke ni povis fini la unuan jaron sen deficino; konsiderante la malaltan kotizon kaj la multajn laborojn, kiujn T. J. O. faris per tiu mono. Li diras, ke dum la lasta duonjaro preskaŭ ne envenis mondonacoj kaj urĝe petas al la plenaĝaj membroj laŭpove subteni la kason.

En la nomo de la kontrolkomisiono f.ino M. Seilberger (Rotterdam) deklaras, ke oni kontrolis la kason de T. J. O. kaj trovis ĉion en bona ordo. La financa raporto estas aprobata.

S.ro Krijt komunikas, ke el du landoj T. J. O. ricevis invitojn por la Internacia Junular-kunveno 1940, nome el Anglio kaj Francio.

F.ino M. Montagnon (ĉefperantino por Francio) proponas oka-

zigi la venontan Junularkunvenon en Nord-Francio, ekzemple en Nancy. Ŝi jam interrilatis pri tio kun diversaj kompetentaj esperantistoj kaj estas certa, ke ni trovos tie kunlaboron.

S.ro Symes (Anglio) diras, ke la Angloj tre ŝatas, ke la kunveno okazos en Anglio. S.ro Sipke Stuit (Arras, Francio) opinias, ke Anglio estus taŭga lando, sed por la ĝusta dividado de la distanco por la partoprenantoj el Anglio, Belgio, Francio kaj Nederlando, estas pli bone elekti Nord-Francion; li proponas la urbon Bulonjo apud Maro, kie la cirkonstancoj ŝajnas al li plej favoraj.

Post kelktempa diskutado oni elektas por la Internacia Junularkunveno 1940 Bulonjon apud Maro. S.ro Stuit prenas sur sin la antaŭpreparan laboron.

S.ro Stuit demandas, kia devos esti la karaktero de la venonta kunveno. Li opinias, ke en la nuna junularkunveno partoprenas tro multe da plenaĝuloj kaj li ŝatus, ke oni fiksu aĝolimon, ekzemple je 18 jaroj por la venonta kunveno.

S.ro Krijt iagrade subtenas la opinion de s.ro Stuit. En ĉi tiu junularkunveno ni allasis krom la gvidantoj kelkajn plenaĝulojn kiuj mem instruas Esperanton en lernejoj aŭ junular-grupoj. Ni faris tion por konatigi al ili nian junularlaboron kaj tiel do akiri bonajn gvidantojn por la estonto. Bedaŭrinde la ĉeesto de la plenaĝuloj malfavore influis la sferon de la kunveno; ĉe kelkaj plenaĝuloj mankis la senton de respondeco por la tuta kunveno. La plenaĝuloj sentu sin en niaj junularkunvenoj infanoj kun la infanoj, jen la ĝenerala gvidlinio.

Sekvas nun la elekto de la estraro. S.ro S. S. de Jong (Huizum, Ned.) demandas, ĉu la estraro ne regule eksiĝas. S.ro Krijt klarigas, ke laŭ la statuto la ĝenerala kunveno decidas pri la restado aŭ forigo de la estraranoj. Li demandas ĉu eble iu havas kritikon je la estraranoj kaj deziras, ke oni anstataŭigu iun estraranon per alia kandidato. Unuanime kaj sub aplaŭdo la tuta estraro estas reelektata.

S.ro Krijt proponas, ke oni elektu en la estraron ankoraŭ s.ron J. Kars (Leerdam, Ned.), kiel prizorganton de la gazetarservo kaj vic-sekretario. Praktike li jam delonge faris laboron de estrarano kiel redaktoro de „De Esperantist” kaj „La Peranto”. Aplaudante oni akceptas ĉi tiun proponon. S.ino Bant (Groet, Ned.), demandas kiu faras nun la laboron de la nederlanda ĉefesperanto, kiu pro trookupeco devis abdiki. S.ro Meydam opinias, ke la estraro povas fari lian laboron; ĉar la estraranoj loĝas en Nederlando ne estas necese elekti novan ĉefesperanton.

F.ino Montagnon (franca ĉesperantino) diras, ke pro la daŭra kresko de T. J. O. en Francio ŝia tasko iom post iom fariĝas tro ampleksa. Ŝi proponas tial elekti regionajn perantojn kaj invitas s.roj Bourvellec kaj Stuit fariĝi perantoj respektive por Bretagne kaj Nord-Francio. Ambaŭ akceptas.

Envenis propono de I. E. L. pri laŭkontrakta kunlaboro, pri kio ni prokrastis la decidon ĝis la jarkunveno.

Post ioma diskutado la kunveno decidas, ne fari kontrakton kun kiu ajn ligo. Principe T. J. O. pretas kunlabori kun ĉiu bonvola kaj bonintenca movado, sed ĝi ne vidas kialon por intima kunlaboro. Sub ĉiuj cirkonstancoj T. J. O. restu sendependa. La kunveno decidas respondi la proponon en tiu senco.

S.ro Krijt deklaras, ke la estraro en la pasinta jaro laboris laŭ la jena principo : ni volis esti nur Esperantistoj, sen pli. Ni opinias, ke T. J. O. nur povas esti utila, se ĝi lasas ĉiun libera; por ĝia propra intereso ĝi ne iru iun direkton. Klasbatalo kaj politiko estu malproksime de niaj infanoj; poste la junularo mem elektu la vojon, kiun ĝi volas iri. Tiel do T. J. O. estas transirejo al la plenaĝula movado. Ĉu ŝanĝi ĉi tiun principon? Ni lasis la decidon pri tio al la Internacia Junular-Kunveno mem, kaj montriĝis, ke ĝi samopinias kun la estraro. La estraro ĝojas pri tio, estas por ĝi instigo daŭrigi laŭ la sama principo.

S.ro Kars ankoraŭ klarigas la celon de la organo „La Peranto inter la Perantoj”. Ĝi estu informilo, en kiu la anoj raportu pri siaj spertoj kaj tiel do instruu unu la alian. Li instigas, ke oni ensendu pli da tiaj raportoj al la redakcio.

S.ino van Veenendaal proponas aparte organizi la plenaĝajn esperantistojn, kiuj volas kunlabori por la junularo. La kunveno opinias tamen, ke tio estas ekster la kadro de T. J. O. kaj do ne apartenas al ĉi tiu kunveno.

S.ro Schut proponas plialtigi la kotizon por membroj-subtenantaj. Li tamen momente ne disponas pri ia konkreta plano sed ĉar ankaŭ la kunveno sentas la neceson de tia plialtigo, oni komisiis al la estraro, ke ĝi detale pristudu ĉi tiun prononon kaj poste elverku projekton.

S.ro Stuit (Francio) proponas okazigi perfektigajn kursojn dum la venonta I. J. K. Principe oni akceptas tion.

S.ro Stuit atentigas la ĉeestantojn, ke, krom la belega flago, farita de Jekke van Dijk, T. J. O. posedas ankoraŭ alian altvaloraĵon de tute alia speco. Li nome havas la plezuron komuniki, ke la

belga samideano, inĝeniero van Dooren (Dorno) el Borgerhout donacis al T. J. O. la imponan kanton „Marŝo de la Junularo”. Sub granda aplaŭdo la anoj akceptas ĉi tiun belegan donacon.

Post nevigla ronddemando S.ro Krijt fermas ĉi tiun unuan membrokunvenon.

F. M.

Korespondu !

En la unua artikolo ni petas niajn anojn, ke ili por T. J. O.-aferoj serĉu kontakton kun la landa ĉefperanto, ĉar ne estas facile por ĉiuj anoj pri iu ajn afero korespondi kun la estraro, kiu ja loĝas en la eksterlando.

Per ĉi tiu konsilo ni nur celas la oficialajn T. J. O.-aferojn. Malgraŭ la malfacilaĵoj precipe nun estas grave, ke vi daŭrigu vian korespondadon kun viaj eksterlandaj geamikoj. Por la amikaj leteroj de eksterlandaj amikoj sendube estos apogiloj kaj konfirmos ilian kredon en nia idealo.

La internacia korespondado estas unu el la plej belaj fruktoj de Esperanto. Ni konservu ĝin; eĉ pli multfoje ni skribu al niaj geamikoj por montri, ke Esperanto ne perdiĝas, malgraŭ milito aŭ militdanĝero.

Tiel ni servos al la celo de Esperanto. Per korespondado estas eble kreskigi interfratiĝon inter la homaro. Kaj tion ni ege bezonas.

Nia Filmo.

La filmo pri la Unua Internacia Junular-kunveno en Groet estis grava sukceso. Ĝi al multaj ĉeestintoj revivigis la belan kunvenon kaj donis al ili agrablajn momentojn.

Multfoje ĝi estas prezentita kaj tiam ĝi ne nur estis bela punkto en la programoj de fest- aŭ propagandvesperoj, sed montriĝis, ke ĝi ankaŭ estis grava propagandilo pro kio multaj aliĝis al nia organizo.

Nun T. J. O. posedas du filmojn ! Ankaŭ la filmo pri la dua internacia Junular-kunveno en Tervuren (Belgio), estas preta. Jam ĝi estas prezentita en kelkaj kunvenoj kaj ĉiuj ĉeestintoj havis nur unu juĝon... belega! Vere ni povas havi nur gratulojn por nia filmisto s.ro Schut.

Bonege sukcesis al li filmi la plej interesajn momentojn de la kunveno. Vidante la filmon oni kvazaŭe denove travivas la kunvenon. Ni vidas denove Tervuren, la amikaron, la dormejojn, la

tendaron, la salonon, la Kongo Muzeon, la banejon, la plej belajn lokojn de la ekskursojn, ktp.

Ni ne dubas. Ankaŭ ĉi tiu nova filmo trovos sian vojon. Ĝi estas luebla por fl. 2.— po vespero. Kopion kostas = 50 nederlandajn guldenojn aŭ samvaloron. Tio eble ŝajnas multo, sed ne estas. Ludonante la filmon por modera prezo, ĝi fakte pagas sin mem. Ni spertis tion en Nederlando.

Se vi volas lui la filmon aŭ mendi kopion, vi skribu al la T. J. O. Filmservo s.ro H. J. Schut, Instruisto, Koedijk, N.-H., ĝiro 310334.

Ankaŭ la filmo pri la Groetkunveno restas luebla. Ĝi estas tre taŭga kiel propagandilo kiam oni volas aranĝi infankurson. La luprezon ni malaltigis. Nun ĝi estas unu guldeno po vespero. Ankaŭ por ĉi tiu filmo vi vin turnu al la T. J. O.-Filmservo.

Peto.

T. J. O. rajtas kalkuli je la morala subteno de siaj membroj. Kaj tion ĝi ne faras vane.

Tamen estas ankaŭ alia flanko, kie nia juna organizo ege bezonas subtenon. Estas la financa flanko. Precipe nun estas malfacile senŝulde ordigi ĉiujn aferojn. Nia kasisto estas ia sorĉisto, sed iam ankaŭ lia eltrovemo elĉerpiĝas. Sed ni atentu, ke tio ne okazu.

Se estas inter vi, kiuj povas malhavi iom da mono, por subteni nian laboron, ni petas, faru tion. Sendu vian monon al nia kasisto, s.ro M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam, poŝtkonto 330139. Li ĝoje akceptos.

Membroj-Simpatiantoj.

Ni memorigas, ke en T. J. O. ankaŭ estas loko por ne-Esperantistoj. Ili povas esti membroj-simpatiantaj. La kotizo estas por tiaj membroj minimume 40 nederlandaj cendoj aŭ samvaloro jare.

80 % de tiu kotizo estas por la enlanda propagando en la lando kie oni varbis la anon. 20 % estas por la ĝenerala T. J. O. kaso. La administrado de la membroj-simpatiantaj estas ĉe la landaj ĉefperantoj. Al ili vi sendu la nomojn de la varbitaj simpatiantoj kaj la kotizon. Li tiam sendos membro-ateston al ili.

En Nederlando la administrado estas ĉe fino Jekke van Dijk, Rauwerd, Fr. Do Nederlandanoj, al ŝi vi estonte sendu viajn novajn membrojn kaj ilian kotizon. La kotizon por la jaro 1939-40a de tiuj simpatiantoj, kiuj jam la pasintan jaron aliĝis, vi ankaŭ sendu al ŝi.

En ĉiuj landoj ni pli vigle eklaboru inter ne-Esperantistoj. Tio

signifas monan subtenon por la T. J. O. kaso. Grave. Pli grave estas, ke ni farante tion, altiras ne-Esperantistojn al Esperanto-sfero. Konatiĝinte al Esperanto ili sendube ne plu longe povos rezisti kaj fariĝos batalantoj en la verda armeo.

Tial, ni laboru inter Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj !

Oficiala Komunikilo.

Envenis en nia redakcejo poŝtkarto kun la ĵena enhavo :

Roterdamo, la 13an de Septembro 1939a.

Estimata Samideano,

Per ĉi tiu poŝtkarto la kaskontrolkomisiono sciigas, ke ĝi la 12an de Septembro 1939a kontrolis la en- kaj elspezojn de la Internacia Junular-kunveno de T. J. O. 7-14 Aŭg. 1939a en Tervuren (Belgio), kaj ke ĝi trovis ĉion en bona ordo.

Samideane salutas,

(sekvas subskriboj) A. M. van Vlaardingen-de Smit,
M. Seilberger.

Komunikiloj pri la organo.

Por ke ĉiu ano ricevu la kvinan numeron de „La Peranto”, ĝi ĉifoje aperas kiel aldonaĵo al „La Juna Vivo”.

Pro manko de spaco diversajn raportetojn ni ne povis enpresigi. Inter alie favora raporto pri la unua publika prezentado de la Tervuren filmo. Ĝin prezentis fino Kloeve Korn en Middelburg. Ĉiuj opinioj pri la filmo estis tre flataj kaj ankaŭ la loka kaj regiona gazeto favore recenzis ĝin.

Geperantoj, sendu kiel kutime viajn raportojn al la redakcio de „La Peranto”. Ankaŭ tiun agadon ne influu la malfavoraj tempcir-konstancoj !

Adresoj. La ĉiutaga estraro de T. J. O.

Prezidanto : s.ro P. Krijt, Veeteeltstraat 156. Amsterdam, Nederl.

Sekretario : s.ro F. Meydam, Lingestraat 11. Leerdam, Nederlando.

Kasisto : s.ro M. v. d. Horst, Johan Idastraat 32, Rotterdam (N.).

Ĝironumero 330139.

Fakadresoj.

Filmservo : s.ro H. J. Schut, Koedijk (N.-H.). Giro 310334.

„La Juna Vivo” : s.ino E. van Veenendaal-Bouwens, Limmen (N.H.)

Ĝironumero 209354.

T. J. O. Gazetar-servo. Red. „La Peranto inter la Perantoj” kaj „De Esperantist” : s.ro J. Kars, Meent 35, Leerdam, Nederlando.

Landaj ĉefperantoj.

Anglio : s.ro John W. Holland, 61 Vandyke Road, Leighton Buzzard, Beds.

Belgio : f.ino D. Decavele, Tuinstraat 26, Harelbeke.

Francio : f.ino Marcelle Montagnon, Instruistino, Alaise par sous St. Anne (Doubs).

Finnlando : s.ro Kivinen, Vipurinlääi, Kouvola, Suomi.

Kimrio : f.ino Rees, Derwydd, Seven Sisters.

Latvio : f.ino Ludmila Jevsejeva, Reformatoru 14/5, Riga.

Litovio : s.ro J. Lazaukas, Ukmerge, Taujenu m. uredija.

Portugaliao : s.ro Santos Junior, Aljustrel, Alemtejo.

Svisio : s.ro Walter Kobelt, Landstrasse, St. Margrethen, St. Gallen.

LA 2-a INTERNACIA JUNULARKUNVENO EN TERVUREN.

Ne nur la plenkreskaj adeptoj de Esperanto havas siajn kongresojn, ankaŭ la juna Esperanto-generacio jam internacie kunvenas. Lastjare okazis en Groet (Nederlando) la 1-a Internacia Junularkunveno de la gelegantoj de „La Juna Vivo”. Ĝi plene sukcesis kaj vekis la deziron daŭrigi tiel. Oni fondis tie la „Tutmonda Junular-Organizon” (T. J. O.), kiu post unu jaro jam havas preskaŭ 900 gemembrojn.. Ĝia organo estas „La Juna Vivo”.

Sub aŭspicioj de T. J. O. okazis ĉi-jare de 7-14 aŭgusto la 2-a Internacia Junular-Kunveno en Tervuren (apud Bruselo). Al Groet venis 200; al Tervuren 350, malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj politikaj. Inter tiuj 350 estis \pm 60 plenkreskuloj kiel gvidantoj aŭ simple interesatoj. La aranĝo estis simpla, sed bona. Oni ne povis kompreni, ke la organizantoj por tiom malalta kotizo (nur f 7.— por la tuta semajno) povis liveri tiom da manĝoj, trinkoj, ekskursoj kaj amuzoj.

La knaboj kaj iliaj gvidantoj tranoktis en la knaba lernejo; la knabinoj kun siaj gvidantinoj en la knabina lernejo. Ĉiuj dufoje tage panmanĝis en la festsalono aŭ „pik-nik-is” ekstere dum ekskurso kaj tagmanĝis en (entute 3) restoracioj. Ne mankis la apetito...

Lundvespere estis la unua kolektiĝo kaj interkonatiĝo en la festsalono, kie la prezidanto de T. J. O., s.ro P. Krijt el Amsterdamo, kaj s.ro H. Rainson el Mehleno kiel prezidanto de la organiza komitato bonvenigis ĉiujn. Oni komune kantis kaj frue disiĝis, ĉar multaj

faris lacigan vojaĝon per aŭtobuso, kelkaj eĉ bicikle el Francujo kaj Frislando.

Mardon okazis vizito al la tre interesa Kolonia (Kongo)-muzeo, promenadoj en parko kaj arbaro, naĝado, ludado ktp. Vespere en la festsalono inaŭguro de la nova T. J. O.-flago, projektita kaj farita de la ĉefestraranino f.ino Jekke v. Dijk (Frislando). Ŝi mem (en frisa kostumo) transdonis la flagon al T. J. O. La prezidanto, eskortita de 8 geknaboj kiel reprezentantoj de 8 diversaj nacioj kun danko akceptis ĝin. Poste 16 el la frisaj partoprenintoj prezentis dancon en frisaj kostumoj, la „Skotse Trye” (Skota Trio) (kun la intermetita figuro „ŝuisteto”). La kimraj infanoj ludis teatraĵeton kaj tre ĉarme dancis kaj kantis.

S.ro Rainson montris lumbildojn pri Bruselo, la belga ĉefurbo vizitota la postan tagon.

La ekskurso al Bruselo bone sukcesis, sed la longa promeno lacigis multajn. Tamen vespere la festsalono denove estis plena, kiam la infanoj de Bishop Auckland (Anglujo) kaj West-Graafthoek (Nederlando) ludis teatraĵetojn.

Jaŭdatene s.ro Schut, la filmisto de T. J. O., en la parko filmis plurajn grupojn, dancojn kaj scenojn. Ankaŭ gazet-fotistoj kaj raportistoj ĉeestis kaj rikoltis materialon por siaj gazetoj.

Vespere estis montrata la filmo pri la unua Internacia Junular-kunveno en Groet kun klarigoj de s.ro Krijt. La infanoj ĝoje aplaudis, kiam ili vidis konatajn vizaĝojn kaj epizodojn. La filmo donis grandan plezuron. La frisoj ludis komedieton : „Rapida Esperanto-Instituto” kaj f.ino Kool deklamis.

Vendredon okazis belega aŭtobus-ekskurso tra Namen, Dinant, Hastières (kie oni piknikis kaj promenis aŭ ripozis), Philippeville, Charleroi al la... dormejoj en Tervuren.

Sabaton T. J. O. havis sian laborkunsidon. Malgraŭ la belega, forloga vetero multaj ĉeestis, kiam la prezidanto, s.ro Krijt, malfermis kaj atentigis pri la rapida kresko de T. J. O. : en 1 jaro 850 geanoj. Krome ĝi jam havas siajn proprajn insignon kaj glumarkon (projektitajn de s.ro M. Meydam), flagon (de f.ino Jekke van Dijk) kaj eĉ „marŝkanton de la junularo” (muziko de Karel Candaël; Esperanto-teksto de F. V. Dorno).

La sekretario, s.ro Floor Meydam, legis la protokolon. La raportoj estis pritraktataj kaj akceptataj. Ankaŭ la financa raporto estis en ordo kaj menciis forigon de ĉiuj ŝuldoj. Tamen la kasisto plendis, ke ne plu venas tiom da donacoj.

Por la 3-a Internacia Junular-Kunveno estis proponoj el Dover (Anglujo), Sud-Francujo, Nancy kaj Bulonjo ĉe l'Maro. Post iom da diskuto oni elektis Bulonjon.

La tuta estraro estis reelektata. S.ro Job Kars, Leerdam, jam redaktoro de la nederlandlingva T. J. O.-organo „De Esperantist” estis al elektata kiel estrarano. Pluraj novaj perantoj en Francujo estis elektataj.

Denove la kunsido akcentis, ke T. J. O. estas preta kunlabori kaj rilati kun ĉiuj Esperanto-organizoj, sed deziras resti sendependa kaj memstara.

Ĉe la ronddemando montriĝis, ke s.ino E. v. Veenendaal-Bouwes, redaktorino de „La Juna Vivo”, ŝatus fondi novan organizon de plenkreskuloj sur la bazo de la zamenhofa idealo.

La prezidanto malkonsilis diskuton en la T. J. O.-kunsido, ĉar ne estis T. J. O.-afero, kaj proponis, ke s.ino van Veenendaal invitu interesatojn al speciala kunveno la postan matenon.

Sabate okazis oficiala festvespero kun teatraĵoj tre belaj de la nederlandaj infanoj, kantado, dancado de la kimroj, parolado de s.ro A. Schwingshagl (Aŭstrujo) kaj deklamado. Parto de ĉi tiu vespero estis disaŭdigata per radio de Bruselo N. I. R.

Dimanĉvespere en la adiaŭa kunveno oni ripetis la plej brilajn prezentaĵojn. Angla knabo tre lerte tapdancis. Oni vigle kantis la propran T. J. O.-himnon. Kaj fino !

Lundon, frumatene oni disiris emociita, travivinte belan semajnon kun multe da amikeco. Ĉu ĝis Bulonjo?!

Huizum (Ned.).

S. S. de Jong Dzn.

Enkresku tiel en viaj idealoj, ke la vivo ne povas forpreni ilin de vi !

**SCHRIFTELIJKE
ESPERANTO-CURSUS
voor beginners**

Bevattende : 1 leerboekje.
16 geciklostyleerde lessen.
1 woordenboekje.
Prijs: 95 cent (met gratis correctie)
Uitgave : „La Juna Vivo”,
Limmen (N.-H.).

**SCHRIFTELIJKE
ESPERANTO-CURSUS
voor gevorderden**

(opleiding A-examen)
25 lessen, 1 leesboek, geschiedenis-
boekje, examen-opgaven.
Prijs : f 1,95 (met gratis correctie)
Uitgave : „La Juna Vivo”,
Limmen (N.-H.).